

Strofoj

El hispana originalo

de Jorge Manrique

tradukis:

Felikso Diez Mateo

Strofoj pro morto de l'patro

Memoru, animi dormita,
veku la senton atente,

Jen la sorto:

pasas la vivo rapide,
vi ne rimarkas, silente
venas morto.

Handwritten musical notation:
♩ 2 1 2 3 4
♩ 1 2 3 4 5
♩ 3 4 5 6 7
♩ 6 5 4 3 2
♩ 1 2 3 4 5
♩ 6 5 4 3 2
♩ 1 2 3 4 5
♩ 6 5 4 3 2

Kiam dezir' realiĝas,
baldaŭ pluzuro foriras,
nun doloro,
kiam ajn estintan tempon
kiel pli bonan ni miras
en ĉi horo.

Se ni observas nuntempon
post minuto ĝi forkuras
jen fiinta.

R

sage konsideri devas
ĉion kio ekmurmuras
iam pasita.

Veniu trompiĝu, pensu:
ĉio kion li atendos
ne plu daŭros
ol tio kion li vidis;
ĝi forpasos kaj li plendos
kaj bedaŭros.

Ĉiu viv' estas rivero
kui enfluas en maron,
tiel morto,
tien granda kaj malgranda
sinjor' en funebra ĉaro,
sama sorto,

Por tiu de akv' abunda
aŭ de akvo neprofunda
horo sonos;
por ĉiu estos egala
ĉu li riĉa aŭ batala
ne pli konos.

Alvoko

Mi forlasas ĉiujn vokojn
de plej gloraj parolistoj
kaj poetoj,
mi ne zorgas la fiklivojn,
ĉar la gustoj portas herbojn
kum sekretoj;
mi nur konfidas al tiu,
kaj hodiaŭ nur Lin vokas
tute vere,
Kiun vivis en la mondo,
sed la mondo Lin ne konis
eĉ senpere.

Nia mondo estas vojo
por alia vera hejmo
sen doloro;
sed oni bezonas saĝon
por trankvili sen eraro
ĝis finhor.

Ekvojaĝo je l' naskiĝo,
ni marŝadas dum ni vivas,
kaj alveno
en moment' de nia morto,
tiam ĉesas jam por ĉiam
nia penso.

Tre bona la mondo estus,
se ni ĝin tre bone uzus,
kiel devo,
ĉar ĝi nur, laŭ nia fido,
servas por gajni tiun
de la revo.

Eĉ propra Filo de Dio,
por nin konduki ĉielon
jen subiris,
kaj li inter ni naskiĝis
kaj sur ter' misere vivis
kaj mortspiris

Rimarku malmultvaloron
de ĉio, kion avide

ni deziras,
en mia perfida mondo,
antaŭ ol morto alvenas
ĝi foriras.

Diru do, kio okazas
kun freŝeco kaj beleco
de l'vizaĝo,
la koloro kaj blankeco
kiam rapide alvenas
maljunaĝo ?

La ruzajtoj, senpripensoj
kaj natura de juneco
korpa forto
ĉio devenas graveco,
kiam estas de maljuno
en la korto.

Ĝi la sango de la gutoj
la ideo tiel vasta
kaj nobleco,
tra multaj vojoj kaj modoj
en la vivo oni perdas
altrangecon.

Tujn oni konsideras
malnoblaj kaj neamindaj,
senvaloraj;
aliajn pro manko de mono
suferas en la oficoj
malhonoraj.

Nek de rangoj nek riĉaĵoj
fidelecon en la vivo
ne atendu;
ili nin lasas tre frue,
filoj de petobulino,
sed ne plendu.

La bienoj de Fortuno
turnas sur giganta rado
tre aktive,
kaj ĝi turnas senripoze
sur objekt' alia ĉiam
efektive.

Sed se ili ĝis la tombo
ianx venas, akompanas
posedanton,
tamen ili lin ne trompos,
ĉar la viv' rapide pasas
por revantoj.

Kaj la ĝojoj tre amataj
kiuj nun tiel ravigas
sur la tero
estos kaŭzo por eternaj
plej teruraj la turmentoj
en infero.

Nun ni kuras frenezuloj
Sen atenti de l' agado
malutilon,
kiam trompon ni rimarkas,
ni deturnus, sed ne trovas
la perilon.

Se ni havus la eblecon
la propran korpan vizagjon
fari bela,
ĉu ne per miloj da manieroj
kaj manieroj ni transformigus
ĝin anĝela?

Kian vivan diligenton
ni aplikus tre rapide
ĉiun horon,
por atingi la vantagjon,
dum forlasas la animon,
nian koron.

Tiuj potentegaj reĝoj
jam pasintaj, laŭ certigas
dokumentoj,
en plurindaj multaj kazoj
estis do deturnigitaj
per konsento.

Ne ekzistas objekt' forta,
papo aŭ imperiestro,
episkopo ...
por la Mort' estas egalaj
nek paŝtistoj la plej simplaj
estas tro.

Ni ne vidis la malbonojn
ankaŭ ne la gloriojn, lasu
do trojanojn;
kvankam ni aŭdis aŭ legis
historiojn, lasu ankaŭ
la romanojn;

ne devas interesiĝi
en la jam antikvaj tempoj
ĉu okazis;
venu ni al tag' hieraŭa
certe ankau forgesita,
ĉio pasis.

Johan' reĝon rememoru,
kaj reĝidojn de la lando
Aragono,
se vi povas al mi diru
kio fariĝis el tiom
da personoj;

vere spritaj la elpensoj
kaj la revoj de amantoj
ĉio finis,
kiel verdo de la arboj
antaŭ vintro malaperas,
ilin minis

la tempo nepardonanta
kavalirojn, nobelulojn,
nek odorojn
kaj vestaĵojn oranviciaj,
kiel ĉiajn amajn flamojn
de la korvoj.

Kio nun el la muziko
dum la noktoj tiel rava
kaj la kanto?
Kio nun el tiuj dancoj
kaj la vestoj kun la gemoj
de l' amantoj?

Kion diri pri potenca
heredinto de Johano,
Moŝt' Henriko?
malsevera, lin dorlotas
kun plezuroj tie mondo
de amikoj

Baldaŭ ĉio estis mala,
ĉio devenis kontraŭa,
kaj kruela;
kinj amikoj komencis
tre malmultaj tiaj restis;
tro malbela.

Tro abundaj la donacoj,
plenaj reĝaj konstruaĵoj,
ĉie oro;
en vazaro ĉio arĝento,
riĉaĵoj nekalkuleblaj
la trezoro.

Mirindaj ĉevalornamoj,
nobeluloj, servistaro,
kia pompo!
sed kie ni serĉos ilin?
ili brilis kiel roso,
ĉio trompo.

Lia frato, senkulpufo,
kiun oni reĝon nomis
por la trono,
plej bonan kortegon havis,
lin sekvis la grandsinjoroj
ne pro mono.

Sed lin mem, laŭ dia juĝo,
Morto sen pardono portis
al la forno,
kaj por liaj partianoj
tiu bedaŭrinda fakto
estis doctro.

Tri Don Alvaro de Luna,
favorito de la reĝo,
ni lin konis,
prefere ni ne parolu,
ĉar gorĝtranĉita li mortis,
Reĝ'ordonis!

Liaj senfinaj trezoroj,
liaj urbetoj, vilaĝoj
kaj posteno,
ĉion li devis forlasi
kaj la tuto por li estis
prema ĉeno.

Kaj la du aliaj fratoj,
en kortego kavaliroj
kiel reĝoj,
kiuj submetis ceterajn
regnanojn al siaj sklavaj
propraj leĝoj;

tiu glora prosperado
tiel alte respektinda
kaj laŭdita,
kio estis? nur aŭtilo
kaj en plej luma momento
mortigita.

Tiom da bonegaj dukoj,
da markizoj, aŭ da grafoj
kaj baronoj,
kiujn ni vidis potencaj,
kie Ĥporto ilin kaŝas
kun la kronoj?

Kaj plej famajn heroojn
de ili en la milito
kaj en paco,
kiam vi kuele volas
perforte vi enterigas
kun grimaco.

Flagoj, signaloj, standardoj
portitaj de la soldatoj
milionoj,
nevenkeblaj la kasteloj
altaj muroj kaj tre dikaj
bastionoj;

profundaj kivasfosajoj,
kui ajn defendobstaklo
nur imago,
kiam venas furioza
Vi, ĉion trapasas, venkas
via saĝo.

Ĉiu ŝirno de l' bonuloj,
respektinda, virta homo,
tre amata
kavalico, Don Rodrigo
Albarrake, tiel fama
vir' ŝtata,

kuraĝega, liaj agoj
ne bezonas nian laŭdon,
vi lin vidis;
mi ne volas ilin citi,
ĉar la mondo ilin konis
kaj decidis.

Amiko de la amikoj,
grandsinjoro por servistoj
kaj parencoj,
malamik' de malamikoj,
modelo de kuraĝuloj
la esenco.

Kia mens' kun diskretuloj!
Spritega kaj rezonanta
la persono;
bonanima por subuloj;
sed por tiuj malhumilaj...
nur leono.

Bonsort' kiel Oktavio;
venkanto, Juli' Cezaro
en batalo;
virta kiel Afrikanos;
en scio kaj laboro
Anibalo;

boneco kiel Trajano,
malavara kiel Eito,
plezurita;
lia brak' Ĥūreliano,
Mark' Eulio en la vero
promesita.

Kompatema, Ĥnton' Pio;
egalec' de mien', Marko
Ĥūrelio;
elokventa, Ĥdriano;
Ĥeodosi' al homar' kaj
am' al Dio.

Ĥūrelio Aleksandro
por milita, rigorega
disciplino;
Kamilo por granda amo,
kaj en fido estis nova
Konstantino.

Grandajn trezorojn ne lasis,
nek multajn riĉajn objektojn
li atingis;
sed batalis kontraŭ maŭroj,
gajnis fortikaĵojn, ĉar li
glavon swingis.

Kiom da maŭroj perdiĝis
en atakoj sangverŝante
kaj ĉevaloj!
sekve de tiu ofico
li ricevis siajn rentojn
de l' bataloj.

Kiel vivis li en tempoj
pasintaj en sia stato
kaj honoro?

Forlasita li do restis
kun gefratoj kaj servistoj
tiun horon.

Post kiam li faris agojn,
kiujn oni laŭdis ĉie,
li jam fama,
gajnis per interkonsentoj
grandan teron pro milito
tiu sama.

Ili estis tre antikvaj
de lia brako pentrolaj
historioj;
sed li ilin renovigis
per venkoj en maljuneco,
dank' al Dio.

Pro lia granda lerteco
pro meritoj kaj la aĝo,
de l' dev' sklavo,
li atingis altan rangon
kaj devenis Kavaliro
de la Islavo.

~
Vilaĝojn kaj terposedojn
li trovis jam okupitaj
de tiranoj,
per sieĝoj kaj bataloj
ĉio denove revenis
liajn manojn.

Ke nia naturo reĝo
de tiaj agoj profitis
estas klara,
atestis do Portugaldo
kiel ankaŭ Kastilio,
fakto rara

Post kiam tiom da fojoj
sian vivon li jam riskis
por la leĝo,
post kiam li tiel bone
servis la kronon de sia
vera reĝo,

post tiom da heroaĵoj,
malfacile rakontebraj
pro multnombraj,
en la vilon de Okanĵa
la ŝorto venis horo
tute ombra.

Kaj ĉi diris: « Kavaliro
bona, la mondon forlasu
kaj allogojn,
ĉar bienoj kaj plezuraj
kiujn ĉi tie vi trovis...
nur mensogoj;

« kaj en decida momento
en kiu mi ne troviĝas
via koro
ĉiam ŝtala, montru forte
ke la plej timata guto
de ĉi horo,

« por homo viva, al kiu
fam' estis indiferenta,
viv' kaj sano

Morto mem signifon havas,
se por vi la fin' alvenis
dia pano.

« Vi nun aŭdas mian vokon
maldolĉa, tamen ne timu
la batalon,

ĉar alia viv' atendas
vin pli longa kaj pli glora
ol en valo,

« kiun vi forlasi devas,
ĝi estas ĉiam nedauŝra
kaj malvero
dua vivo de honoro;
ĉio bezonas pereci
sur la tero.

« La viv'eterna ne gajnus
per kiu ajn granda ŝtato
de la mondo,
nek per abomena vivo
kie loĝas ĉiuj pekoj
de la rondo.


« Oni gajnas per pentploroj
kaj per puraj koraj preĝoj
religiaj,
aŭ per labor' kaj malĝojo
de la famaj kavaliroj
kaj tre piaj.

« Kaj ĉar vi, ho glora homo,
tiel honore militojn
partoprenis,
konfide la rekompenco
devas esperi; vi mortis
kaj ĝi venis.

«Kion vi per viaj manoj
en ĉi tiu mondo gajnis,
homo fida,
vi havos en viv' alia;
fluigu nun al trua vivo
plenkonfida.»

Preĝo

(de Don Rodrigo al Morto)



Jam ne plu mi havas tempon
en ĉi tiu viv' misera
kaj pro tio
mi volo akordiĝas
kun la Dia, ĉar tre vera
estas ĉio.

Mi konsentas, mian morton
kun ĝoja, pura, klara
la deziro,
ne decaŝ ke homo vivu
kontraŭ Dia superstara
jista diru.

Vi, kiu pro ni subiĝis,
kaŭze de ~~mi~~ malbono mia,
esti homo,
Vi, kuniginta diecon
kun homa naturo Via,
Dio-homo;

Vi, kiu por ni suferis
tiel teruran turmenton,
Vi persone,
pardonu min, ne merite,
helpu min ^{en} ĉi momenton
morti bone.

FINO

Kun tia klera kompreno
kaj kun ĉiuj homaj sentoj
konservitaj,
eligis el ĉiu peno
li, en dekkvina jarcento,
ĉivkaŭita
de sia kara edzino,
filoj, tuta familio,
servistaro,
alvenis al lia fino,
donis animon al Dio,
(granda faro)
de kiu li ĝin ricevis,
kaj Dio al li ĉielon,
plenan gloron,
kian li neniam revis.
Por ni nun estas brilstelo:
rememoro.



K o m e n t a r i o

de l' tradukinto.

Je memoro de Moŝto Pet.
Ikaza, Markizo Moreaga d.
Ikaza, fondinto de gloraj
maĵonfaraj kaj kulturaj ins-
titucioj.

Tremanta voĉo de la patro vokas:

"Profitu tempon de restad' sur tero,
Sensencaj homoj pri postvivo mokas,
Plezuro estas nur por ili vero.

"Nur virto donas la plej grandan ĝojon
Por homojn liberigi de l' infero
Necese devas vi servi la vojon
De l' sanktaj amo, fido kaj espero."

Mirindaj estas la Manrikaj pensoj,
Enhavo: la popolfilozofio;
Kortuŝaj, ili restu en la menso,
La kvintesencó de la Religio.